

Redakta noto

Kiom da ISAE-anoj vere legas nian asocian organon? Laŭ miaj kaŝaj enketoj ne tre multaj. La fidelaj legantoj tamen certe interesiĝas pri la ĉi-jara ISAE-jarkunveno kadre de la UK en Vilno, kiun protokolis d-ro *Vergara*, Landa Delegito de ISAE en Ĉilio, jene:

- post malfermo de la jarkunveno je la 28-a de julio 2005, 9h00, la prezidanto konstatas, ke ISAE fondiĝis en 1906 kaj sekve festos la centjariĝon sekvontjare (2006-07-24/28) per scienca konferenco en *Tavoletto* / Italujo, do en la semajno ĝuste antaŭ la 91-a UK en Florenco;
- SR publikigas artikolojn en Eo precipe por daŭre pludisvolvi la uzon de la internacia lingvo pri sciencaj temoj; ISAE mem, kun nuntempe ĉ. 150 membroj, plejparte konsistas ne el profesiaj sciencistoj sed el interesatoj pri sciencaj aferoj el diversaj fakkampoj, kiuj konvinkiĝis pri la graveco de la sciencpublikiga utiligo de Esperanto;
- prof. *Wandel* salutas nome de la UEA-estraro kaj substrekas la gravecon de ISAE kiel scienca fakasocio kadre de UEA; d-ro *Ferency* salutas kaj transdonas amikecan diplomon de UMEA al ISAE, tiel akcentanta la valoron de fakasocia kunlaboro;
- la prezidanto denove instigas al verkado de artikoloj por SR. Por sia pluekzistado ISAE bezonas nek mondonacojn nek patronecojn, sed ja la legadon de kaj la aŭtoradon por Scienca Revuo;
- post la komuniko fare de la prezidanto pri la fino de la trijara estrarperiodo 2003-2005 kaj necesa laŭstatuta novelekto de estraro kaj prezidanto por la periodo 2006-2008, d-ro *Vergara* proponas elekti aklame la nunan prezidanton por plua prezidanteco, kion oni aplaŭde kaj grandnombre subtenas; li plue emfazas reklami por ISAE cele de konigado de nia asocio al pli multaj esperantistoj kaj sciencamantoj; s-ro *Sly* kontentas pri la neeliteco de ISAE kaj devigas sin, estonte pli aktive propagande informi ĉe sialandaj Eo-organizaĵoj.
- malgraŭ la fiera nombro de 57 ĉeestantoj nur 3 ISAE-estraranoj partoprenis la jarkunvenon (prezidanto, ISAE-komitatano A ĉe UEA kaj 1 Landa Delegito): tio ne sufiĉis por kunvoki laŭstatutan kaj decidpovan estrarkunsidon;
- la membrototizo restas la sama kiel en la antaŭaj jaroj (€ 20,00), sed estonte pagenda sole al la konto isae-z ĉe UEA (la germanuja poŝtbanka ISAE-konto estas nuligita) aŭ la landa peranto de ISAE;
- la prezidanto fermas la ISAE-jarkunvenon 2005 je 10h30.

Konstanta stato kiel lingvoscio ĉe *Chomsky* : ĉu ĝi estas efektive stabila kaj unuforma?

Hiroshi NAGATA

Resumo

En la genera gramatiko de *Chomsky*, la fina konstanta stato (Ss) kiel lingvoscio estas plej ofte komprenata kiel stabila kaj unuforma. La fakto tamen estas, ke en 1979 *Chomsky* akceptis nestabilan kaj neunuforman aspekton de Ss. Tiu ĉi artikolo diskutas implicojn de la fakto, rilatigante ĝin al lia tezo de denaskismo pri lingvoakiro, kaj sugestas, ke la fakto malfortigas la tezon.

Enkonduko

La stato de lingvoscio en la genera gramatiko de *Chomsky* (en la sekva teksto “Ĉomsko“ konforme al la Esperanta ortografio, escepte dum referencado) koncernas la staton, kiun ĉiuj infanoj normalaj atingas post kelktempa elmetiĝo al sia gepatra lingvo. Tiun ĉi staton *Chomsky* (1980, p.37) unue karakterizis kiel “konstanta stato“ (angle *steady state*: Ss), kiun universale determinita “komenca stato“ (angle *initial state*: So) fine atingas, trapasinte statojn S1, S2, ... inter So kaj Ss.

Ss, laŭ lia teorio, estas ĝuste la stato kiun, unuflanke, ĉiuj normalaj homoj atingas unuforme kaj kiun, aliflanke, priskribas lia genera gramatiko. Kiam Ĉomsko menciis tiun ĉi staton, li aldonis certan rezervon pri la stabileco de Ss, nome ke Ss ŝanĝeblas, sed nur periferie pro la aldono de novaj vortoj (*Chomsky* 1980, 1986). Lia karakterizado de Ss do implicas, ke neniom da ŝanĝoj okazas je la fundamento de gramatiko (pli precize, je tiu de sintakso) se Ss estas unu fojon atingita. Tamen, ĉu Ĉomsko